

La homaranismo de Zamenhof

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 499, 1981.07.23 & 25

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Antaŭ 75 jaroj, antaŭ kaj dum la dua Universala Kongreso de Esperanto okazinta en Ĝenevo en 1906, Ludoviko Zamenhof publikigis sub diversaj pseŭdonimoj siajn deklarojn pri hilelismo, kaj poste pri homaranismo, kaj respondojn al kritikoj. Tiuj respondoj atestas, ke ĉefe en religiaj medioj, oni vigle reagis al la dogmoj de la homaranismo. Kaj tiu, kiu plej pasie atakis la homaranismon, estis la markizo Louis de Beaufront, kiu du jarojn poste kunlaboros kun Louis Couturat favore al la ido-reformo. La publikigo fare de Zamenhof de la deklaro pri homaranismo tre verŝajne instigis homojn kiel de Beaufront distanciĝi unue de la aŭtoro de esperanto, kaj poste de lia lingvo mem.

A.- Ni ekzamenos, kio ŝokis la esperantistojn en tiu deklaro de homarano, interalie per la nefermita letero, kiun Zamenhof publikigis responde al de Beaufront, sub la pseŭdonimo de d-ro Aleksandro Naumann, sekretario de la Unua Grupo Homarana, en la gazeto "Ruslanda Esperantisto" en junio 1906. Sed unue, ni intimiĝu kun la dogmoj mem de homaranismo.

C1.- En la Originala Verkaro de Zamenhof, enkonduke al la publikigo de tekstoj pri hilelismo kaj homaranismo Johannes Dietterle skribas:

A.- "La tre ideala homaranisma ideo okupis (Zamenhof) dum lia tuta vivo, kaj - kiel ŝajnas al mi - por li estis ankoraŭ pli grava, ol la tuta ideo de internacia lingvo, kiu evidente servis al li nur kiel vojo al la ideala celo, kiun li esprimas per la preskaŭ sinonimaj teorioj "hilelismo" kaj "homaranismo". Pro diversaj kaŭzoj li komence timis, publikigi siajn ideojn sub sia nomo: Unue pro la politika situacio en la tiama Rusujo, Due pro tio, ke li antaŭvidis atakojn kaj kritikojn eĉ de la plej fidelaj adeptoj de lia lingva ideo. Trie ĉar li ne volis, ke oni intermiksus la du por li samcelajn, sed principe diversajn ideojn."

Cl.- En 1906 la esperantistoj tuj divenis, ke la aŭtoro de la deklaroj pri "hilelismo", kaj kelkajn monatojn poste pri "homaranismo" estis Zamenhof mem. Kaj la dua Universala Kongreso forviŝis tiurilate la lastajn dubojn.

A.- La citaĵojn, kiujn ni faros, ni ĉerpas el la broŝuro aperinta en rusa lingvo kaj en esperanto en 1906 en Sankt Peterburgo, kiel "plibonigita kaj kompletigita eldono de Dogmoj de Hilelismo". Estas interese scii, ke tiuj dogmoj pri Hilelismo estis publikigitaj en la organo "Ruslanda Esperantisto" en januaro 1906, kaj dum la sekvantaj monatoj la sama revuo publikigis unue aldonojn kaj poste respondojn al kritikoj kaj atakoj.

Cl.- La **Deklaracio de Homarano** estas enkondukita de kelkaj klarigoj, kie oni interalie legas:

A.- "Longan tempon la iniciatoroj de la homaranismo ne kuraĝis precize formuli siajn dogmojn, timante, ke tio, kio teorie ŝajnis bona, en la praktiko eble montriĝos neplenumbla. Sed en la jaro 1905 okazis io, kio neniigis ĉiujn dubojn. En Aŭgusto 1905 en la franca urbo Boulogne-sur-Mer havis lokon la unua tutmonda kongreso de esperantistoj, kies sukceso superis ĉiujn atendojn. Pli ol mil homoj, kiuj alveturis el la plej diversaj landoj de la tuta mondo kaj apartenis al 22 diversaj popoloj kaj al la plej diversaj religioj kaj filozofiaj sistemoj, en la daŭro de tuta semajno vivis kune en la plej sincera amikeco kaj frateco, parolis

inter si ekskluzive nur en neŭtrala internacia lingvo, konfesis religiajn principojn nur neŭtrale-homajn..."

Cl.- Tiu ĉi teksto pravas, ke la sukceso de la Bulonja kongreso kaj la anoncita dua Universala Kongreso okazonta en Ĝenevo instigis la aŭtoron de esperanto publikigi siajn ideojn. Por li la tempo estis matura. Ni ankoraŭ citu tiun ĉi tekston:

A.- "La mirinda sukceso de la Bulonja kongreso konvinkis la iniciatorojn de la homaranismo, ke absoluta justeco, egaleco kaj frateco inter la popoloj en la praktiko estas plene ebla. Tial ili decidis proponi al ĉiuj amikoj de interpopola justeco unuiĝi en apartan grupon, kiu inter la amikoj de internacia lingvo prezentus apartan sektion."

Cl.- Kaj noto aldonis:

A.- "Oni ne devas intermiksi la homaranismon kun la esperantismo! Ambaŭ ideoj estas tre parencaj inter si, sed tute ne identaj. Oni povas esti bonega esperantisto kaj tamen kontraŭulo de la homaranismo."

Cl.- Tio, kio verŝajne ŝokis multajn esperantistojn, estis la tono de absolutismo de tiu traktaĵo. Jen tiurilate tipa frazo:

A.- "La homaranoj estas konvinkitaj, ke ili staras sur fundamento de **absoluta vero**, kiu pli aŭ malpli frue **devos** venki, kiel ajn longe la mondo batalus kontraŭ ĝi..."

Cl.- Tiu religia aŭ profeta tono verŝajne malhelpis Zamenhof. Li utiligis religian vortaron, kiu estis miskomprenata. Estis fakte hebreo kiu parolis. La kristanoj reagis negative, kaj la liberpensuloj ankaŭ, sed ne pro la samaj kaŭzoj.

A.- Jen nun ni legos la komencon de tiu « Deklaracio de Homarano ». Niaj enkondukaj vortoj certe helpas aŭskulti ĝin kun kompreno. Ni citas :

Cl.- "Kiam oni min demandas, kiu mi estas, kiaj estas miaj naciaj konvinkoj, religiaj principoj, mia celado kaj idealoj, mi respondas:
"Mi estas homarano". Tio ĉi signifas, ke mi estas homo, kiu sin gvidas per la sekvantaj dogmoj:

A.- "Mi estas homo, kaj por mi ekzistas nur idealoj pure homaj; ĉiajn idealojn kaj celadon gente-naciajn mi rigardas nur kiel grupan egoismon kaj hommalamon, kiuj pli aŭ malpli frue devas malaperi kaj kies malaperon mi devas akceli laŭ mia povo.

Cl.- "Mi kredas, ke ĉiuj popoloj estas egalaj kaj mi taksas ĉiun homon nur laŭ lia persona valoro kaj agoj, sed ne laŭ lia deveno. Ĉian ofendadon aŭ persekutadon de homo por tio, ke li naskiĝis de alia gento, kun alia lingvo aŭ religio ol mi, mi rigardas kiel barbarecon.

A.- "Mi kredas, ke ĉiu lando apartenas ne al tiu aŭ alia gento, sed plene egalrajte al ĉiuj ĝiaj loĝantoj, kian ajn lingvon aŭ religion ili havas; la intermiksadon de la interesoj de lando kun la interesoj de tiu aŭ alia gento, lingvo aŭ religio mi rigardas kiel restaĵon de la tempoj barbaraj, kiam ekzistis nur rajto de pugno kaj glavo.

Cl.- "Mi kredas, ke en sia familia vivo ĉiu homo havas plenan naturan kaj nedisputeblan rajton, paroli kian lingvon aŭ dialekton li volas kaj konfesi kian religion li volas, sed en

komunikiĝado kun homoj de alia deveno li devas, kiom ĝi estas ebla, uzadi lingvon neŭtrale-homan kaj vivi laŭ la principoj de religio neŭtrale-homa. Ĉiun celadon de unu homo, altrudi al aliaj homoj sian lingvon aŭ religion, mi rigardas kiel barbarecon.

A.- La venontan semajnon ni daŭrigos la legadon de aliaj dogmoj de la "Deklaracio de Homarano", kiuj estas fakte tre detala priskribo de la penso de Ludoviko Zamenhof kaj meditando principoj.

C1.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond diras al vi, ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), aŭgusto 2012*